# Vikipedio: 10 jaroj, kaj poste?

- Origine prezentita de: Marek Blahuš (E@I)
- Semajno de Esperanto 2011
- Strasbourg, 2011-04-08

- prelego en Esperanto
- conférence en espéranto avec interprétation simultanée en français

Strukturo de la prelego estas inspirita de la libro *Vikipedio por vi* de Ziko van Dijk (CC-BY-SA) aperinta en 2008 ĉe Espero/E@I en Partizánske; modifoj Marek Blahuš.

La nomo *Wikipedia®* kaj la *puzla globo* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.

# Prezento de la parolanto

- Marek BLAHUŠ
- studento de aplikata informadiko
  ĉe la Masaryk-Universitato
  en Brno (Ĉeĥio)
- staĝanto por la organizo E@I (Edukado@Interreto) en Nancy (Francio)
- redaktoro de Vikipedio ekde 2004 (eo, cs, en)
- stipendiita partoprenonto de Wikimania 2011
- denaska parolanto de la ĉeĥa, esperantisto

http://commons.wikimedia.org/wiki/File:E@I_angula.jpg E@I, CC-BY-SA

# La misio de la Vikipedio

„Imagu mondon, en kiu ĉiu unuopa persono ricevis liberan aliron al la tuto de la homa scio... Jen tio, kion ni faras.“

-- Jimmy Wales,
fondinto de Vikipedio



http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Jimmy_Wales_Fundraiser_Appeal_edit.jpg Manuel Archain for Jimmy Wales, CC-BY-SA

# Kio estas Vikipedio?


en: *Wikipedia*, fr: *Wikipédia*

- Enciklopedio
  - Interreta
  - Libera (senkopirajta)
  - Kunverkata (de volontuloj)
  - Multlingva
  - Neŭtrala
- Sed ĉu tio estas nova inventaĵo?
  - Ne kaj jes!

La nomo *Wikipedia*® kaj la *puzla globo* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.

# Enciklopedioj

- Superrigardoj de la sciencoj jam en la antikvo
  - Aristotelo (384-322 a.K.)
- Modernaj enciklopedioj ekde la 18-a jarcento
  - Denis Diderot (1713-1784): *Encyclopédie* (1751)
  - plilumigi la mondon per scio, en etna lingvo



ENCYCLOPÉDIE,
OU
DICTIONNAIRE RAISONNÉ
DES SCIENCES,
DES ARTS ET DES MÉTIERS,
PAR UNE SOCIÉTÉ DE GENS DE LETTRES.

Mis en ordre & publié par M. *DIDEROT*, de l'Académie Royale des Sciences & des Belles-Lettres de Prusse; & quant à la PARTIE MATHÉMATIQUE, par M. *D'ALEMBERT*, de l'Académie Royale des Sciences de Paris, de celle de Prusse, & de la Société Royale de Londres.

*Tantùm series juncturaque pollet,*
*Tantùm de medio sumptis accedit honoris!* HORAT.

TOME PREMIER.

A PARIS,

Chez BRIASSON, *rue Saint Jacques, à la Science.*
DAVID l'aîné, *rue Saint Jacques, à la Plume d'or.*
LE BRETON, Imprimeur ordinaire du Roy, *rue de la Harpe.*
DURAND, *rue Saint Jacques, à Saint Landry, & au Griffon.*

M. DCC. LI.

*AVEC APPROBATION ET PRIVILEGE DU ROY.*

http://commons.wikimedia.org/wiki/File:ENC_1-NA5_600px.jpeg PD

# Problemoj de enciklopedioj

- Dilemo de presita enciklopedio:
  - Malgranda libro: limigita enhavo, supraĵa pritrakto
  - Granda libro: pluraj volumoj, multekosta
- Malnoviĝo de scio estas konstanta
  - Kiam enciklopedio eldoniĝas, ĝi jam estas malaktuala!
- Presi indas nur por granda merkato (fr, de)
  - Por malgranda lingvo (sv, cs, eo...) malfacilas krei enciklopedion kaj malmultaj ekzistas

# Komputiloj kaj interreto

- Teknikaj antaŭkondiĉoj por la ekesto de Vikipedio
- Unua *computer* jam en 1946
  - Aĉeteblaj hejmkomputiloj en la 1970-aj jaroj
  - Disvastiĝo nur en la 1990-aj jaroj
- Interreto *(ARPANET)* jam en 1969
  - *World Wide Web* nur en 1993
  - *Unicode* disvastiĝis nur en la 2000-aj jaroj

# Kopirajto ©

- J. H. Zedler: *Universal-Lexicon* (1731-1754)
  - unua moderna enciklopedio en la germana lingvo
  - akuzo: li nur kopiis el aliaj, malgrandaj leksikonoj!
  - refuto: ili mem faris same, ofte kopiis el la franca!
- Moderna kopirajto (ekde 19-a jarcento):
  - eblas nur mallonge citi, kun indiko de fonto
  - oni ne rajtas senpermese kopii grandan parton
  - nur 70 jarojn post la morto verko fariĝas libera
  - la reguloj povas tre varii laŭ la lando

# Libera scio

- *Free Software Foundation* (1985)
- *free* kiel *free speech* („libero de parolo“),
  ne kiel *free beer* („senpaga biero“)
- La aŭtoro ne postulas kopirajton, sed permesas al ĉiuj homoj uzi sian verkon
  - permesilo (*license*) – jura konstruo
    - publika havaĵo *(public domain)* – plej radikala kaj fama, ĉiu rajtas laŭdezire kopii la verkon, sen pagi al iu, uzi ĝin komerce, ŝanĝi ĝin, krei novan verkon (kopirajteblan) surbaze de ĝi ktp. (ekz. verkoj de la usona registaro)

creative commons

- Sistemo de permesiloj, kiu donas al la aŭtoro eblon difini, kiujn rajtojn li volas teni kaj kiujn cedi

| | | |
|---|---|---|
| | BY | **Atribuite:** Vi devas atribui la verkon en la maniero specifita de la aŭtoro de la verko (sed ne misatribui ĝin). |
| | NC | **Nekomerce:** Vi ne rajtas uzi la verkon por komercaj celoj. |
| | ND | **Nemodifite:** Vi ne rajtas aliigi la verkon, transformi ĝin aŭ krei devenaĵojn bazitajn sur ĝi. |
| | SA | **Samkondiĉe:** Se vi aliigas la verkon, vi rajtas distribui la rezultan verkon nur laŭ la sama aŭ kongrua permesilo. |

- Vikipedio uzas la permesilon CC-BY-SA

La *duobla C en cirklo*, la vortoj kaj la emblemo *Creative Commons* kaj la permesilaj etikedoj *Creative Commons* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de la korporacio Creative Commons kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.

# Kunlaboro de volontuloj

- Vikipedio donas al homoj 4 liberojn:
  1. Libere konsulti la enhavon
  2. Libere modifi ĝin (por ajna celo)
  3. Libere redistribui ĝin (por helpi al sia najbaro)
  4. Libere redistribui modifitajn versiojn (por helpi al la komunumo)
- Tio motivigas la legantojn mem kontribui kaj certigas progreson de la projekto


# Kial homoj kontribuas?

- Ili ŝatas verki kaj volonte informas pri iu sia fako
- Ili mem ŝatas legi Vikipedion kaj pensas:
  - Se aliaj verkas pri siaj fakoj kaj mi profitas de tio, tiam ankaŭ mi volas doni ion al la komunumo
- Ili povas facile kunlabori kun siaj samfakuloj
  - Antaŭe multaj verkis ĉiu por sia privata hejmpaĝo

# Kiel tio povas funkcii?

- Ĉiu povas redakti ĉion, eĉ sen registriĝo
- Tial vandalaĵoj kaj malprecizaĵoj okazas, sed kutime rapide malaperas
- Gravas ke averaĝe estas pli da bonaj ol malbonaj redaktoj → kresko
- Ĉiu rajtas facile malfari ĉies redakton
  - La peno vandali estas pli granda ol ripari
- Administranto rajtas ŝlosi paĝon aŭ forbari uzanton
  - Esceptaj okazoj (sekso, drogoj, politiko, religio)

# Kunlaboro




La diagramo laŭ CC-BY-SA; aŭtoro: Dr. Ziko van Dijk; esperantigo: Marek Blahuš


# Historio de Vikipedio

- Jimmy Wales (*1966 en Usono)
- Marto 2000: *Nupedia*
  - Interreta enciklopedio kun dungita ĉefredaktoro
- Januaro 2001: *Wikipedia*
  - La *wiki*-principo
    - Retejo redaktebla de la legantoj
  - *Wikipedia* = *wiki* + *encyclopedia*
    - Laŭ havaja *wiki-wiki* = „rapida“




http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Wiki_Wiki_bus_%28cogdog%29.jpg
Alan Levine, CC-BY

# Konstanta kresko




http://commons.wikimedia.org/wiki/File:EnwikipediaArt.PNG HenkvD, CC-BY-SA

# Wikimedia Foundation

- Fondaĵo establita en 2003 en Usono
- Neprofitdona, senkapitala
- Wales transdonis al ĝi ĉiujn siajn rajtojn
  - anstataŭ enspezi miliardojn per reklamo
- 10 honoroficaj estraranoj
- ~20 salajrataj dungitoj – administrado
  - 300 serviloj en Florido, 44 en Amsterdamo
  - 25.000-60.000 paĝopetoj sekunde

La nomoj *Wikimedia* kaj *Wikimedia Foundation* kaj la emblemo *Wikimedia Foundation* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.

# Plej popularaj retejoj

| Firmao | Vizitantoj monate |
|---|---|
| 1. Google | 920 milionoj |
| 2. Microsoft | 734 milionoj |
| 3. Yahoo | 599 milionoj |
| 4. Facebook | 471 milionoj |
| 5. Wikimedia | 365 milionoj |
| 6. AOL LLC | 267 milionoj |
| 7. EBay | 260 milionoj |
| 8. Amazon | 245 milionoj |
| 9. Ask Network | 228 milionoj |
| 10. CBS | 212 milionoj |

http://meta.wikimedia.org/w/index.php?title=User:Stu/comScore_data_on_Wikimedia&oldid=2074713 Meta-Wiki contributors, CC-BY-SA

http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Fundraising_2010_1026_FR.png Dgultekin, CC-BY-SA; pritondo: Marek Blahuš

# Wikimedia Foundation

- Kolektas donacojn kaj subvenciojn
  - de aliaj fondaĵoj (Ford, Hewlett, Google...)
  - de la uzantoj (en ĉiujara kampanjo)
    - 2011: kolektiĝis 16 milionoj da usonaj dolaroj



# Lingvoj en Vikipedio

- Komence de 2001: nur angla lingvo
- Poste en 2001: de, ca, ja, fr, ru, nl, es, pt, sv, eo
- Januaro 2004: malpli ol 50 % en la angla lingvo
- Aprilo 2011:
  - 281 lingvoj, kondiĉoj por novaj
  - plej grandaj:
    - en (3,6M), de (1,2M), fr (1,1M)
    - pl (792K), it (789K), es (747K), ja (742K), ru (698K)
    - nl, pt, sv, zh, ca, no, uk, fi, vi, cs, hu, ko, id, ro, tr, da, ar, eo

La nomo *Wikipedia®* kaj la *puzla globo* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.

# Kial multlingveco gravas

- Por multaj malgrandaj lingvoj unua enciklopedio
  - Stimuli evoluon (araba, bengala, svahila)
- Utila helpo por tradukistoj
  - al kiuj mallongaj priskriboj en vortaroj ofte nesufiĉas
- Stimulo de multlingveco ĉe la leganto
  - Eblas rapide konsulti aliajn lingvoversiojn de artikolo, kiuj ne estas la sama teksto

# Kiel Vikipedio multlingviĝis

- Originala programaro ne subtenis diakritikon nek nacilingvajn uzanto-interfacojn
- En 2002 esperantisto Brion Vibber programis subtenon por esperanto: *cx* → *ĉ*
- En 2002-03 li aldonis subtenon por Unikodo
  - Granda helpo al la japana, rusa, pola, hebrea...
  - Aperis ankaŭ eblo nacilingvigi la interfacon
  - Brion fariĝis unua dungito de Wikimedia Foundation

La nomo *Wikipedia*® kaj la *puzla globo* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.


# Kio Vikipedio **ne** estas?



http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Be_bold_cs.jpg User che on cs.wikipedia, CC-BY-SA

# Vikipedio ne estas papera

- Ne ekzistas limo por kvanto de temoj, longo de artikoloj aŭ amplekso de la tuta enhavo
- Ne ekzistas redaktolimoj, ĉiam eblas tuj korekti:



# Vikipedio ne estas vortaro

- Artikoloj en Vikipedio ne estas:
  - Difinoj – artikolo ja komencu per difino, sed provizu ankaŭ aldonajn aferojn pri la temo
  - Vortarecaj – ili temas pri persono, grupo, koncepto, loko, aĵo, evento ktp.; elparolo, etimologio, sinonimoj ktp. iru al Vikivortaro
  - Lingva eksperimentejo – oni uzas la kutiman lingvon, ne slangon, ĵargonon aŭ neologismojn (sed ja skribas oni skribas pri tiuj temoj)

# Neniu originala esploro

- Vikipedio ne estas taŭga loko por viaj propraj pensoj aŭ novaj informoj
  - Ne proponu novajn teoriojn aŭ solvojn aŭ viajn proprajn observojn, ne enkonduku novajn vortojn
    - Anstataŭe unue publikigu aliloke
  - Propraj inventaĵoj ne taŭgas
    - Se vi inventis novan planlingvon, trinkludon aŭ dancon, ne tuj skribu pri ĝi en Vikipedio
      - Ĝi ankoraŭ ne estas enciklopedie menciinda

http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Uzanto-Diskuto:Roberto&oldid=3247318 Robert Weemeyer, Yekrats, Umberto, CC-BY-SA

# Vikipedio ne estas forumo

- Ne skribu rakontojn en la unua persono
- Diskutu en la diskutpaĝoj, ne en artikoloj mem
  - Limigu la diskuton al tio kio helpas la verkadon
- Privatajn informojn publikigu en via uzantopaĝo
  - Komunumo estas grava parto de Vikipedio

## Vikiligiloj [redakti]

Kara samnomulo, mi ĵus rimarkis vian prilaboron de la artikolo pri John Lewine verkita de mi. Koran dankon pro viaj aldonoj de enhavo.

Vi krome faris tre multajn vikiligilojn al artikoloj, kiuj nur flanke rilatas al s-ro Lewine, ekzemple al la artikolo milito. Laŭ mia opinio oni uzu nur malmultajn, sed des pli utilajn ligilojn. Tro da ligiloj povus eĉ kaŝi la gravajn ligilojn, la teksto aspektas iom malbele kaj estas malfacile tralegi ĝin rapide. Kion pensas vi? -- Robert Weemeyer 13:11, 1. Feb 2008 (UTC)

## Framasonismo [redakti]

Roberto, mi konstatis ke vi verkis artikolon pri Framasonismo. Ĉu vi estas Framasono?

Mi estas framasono, kaj mi estas parto de la "Komitato de Edukado" de mia loĝio. Se vi estas ankaŭ framasono, eble estus interesa interbabili pri niaj loĝioj, pri (nesekreta) informo, ktp. Mi parolus (raportus) al mia loĝio pri internacia (brazila) framasonismo. Se vi volus diskuti tiel, bonvolu kontakti min per retpoŝto: (yekrats@gmail.com)! Dankon... -- Yekrats 15:00, 3. Mar 2008 (UTC)


## Dosiero:Bandeirag.jpg [redakti]

Saluton, en 2005 vi alŝutis flagobildon Dosiero:Bandeirag.jpg. Mi kredas, ke *bandeira* signifas "flago", do la vera nomo de la bildo estas nur "g", kaj vi ne donis komenton. Ĉu vi povus diri, kia flago ĝi estas? Ĝi estas uzata en la artikolo pri Volta Redonda, sed ankaŭ tie mi ne vere komprenas, ĉu ĝi estas ties flago aŭ ne.

Interese iu nun alŝutis samnoman flagon al la Komunejo (commons:Image:Bandeirag.jpg), sed ĝi aspektas tute malsame.

# Vikipedio ne estas kristalsfero

- Ne taŭgas skribi pri estontaj aferoj, se ili ankoraŭ ne estas sufiĉe certaj
  - Indas skribi pri la Olimpiaj ludoj de Londono 2012
  - Sed ne pri tiuj de 2032, ĉar oni scias nenion pri ili



http://commons.wikimedia.org/wiki/File:3DCrystal_ball.png PD

# Vikipedio ne estas reklamejo

- Ne propagandu
  - Artikoloj komercaj, politikaj, religiaj ktp. raportu neŭtrale pri la temo, ili ne konvinkadu
- Ne reklamu
  - Reklameca lingvaĵo ne taŭgas por Vikipedio
  - La komunumo decidas pri menciindeco
- Ne reklamu vin mem
  - Estas pli bone atendi, ke aliulo verkas pri vi

# Kvin principoj

1. Vikipedio estas enciklopedio
2. Vikipedio havas neŭtralan vidpunkton
3. Vikipedio estas libera
4. Vikipedio havas propran kondutan kodon
5. Vikipedio ne havas fiksajn regulojn

# Vikipedio estas enciklopedio

- Komponata el elementoj de ĝeneralaj kaj fakaj enciklopedioj, almanakoj kaj atlasoj
  - Verku pri tiaj temoj, kiujn vi imagus ankaŭ en papera enciklopedio (kiu ne havas limon de spaco)

## Franca revolucio de 1789

La **Franca revolucio de 1789** estas periodo de politikaj kaj sociaj transformoj komencita de la alvoko al la "Ĝeneralaj Statoj" en 1789, kaj finita de la Puĉo de la 18-a de brumero (9-a kaj 10-a de novembro 1799) fare de Napoléon Bonaparte. Unuafoje en Eŭropo estis signife faligita monarkio kun ties feŭdaj privilegioj por la nobelaro kaj la katolika klerikaro. Aperis novaj regnoj (konstitucia monarkio kaj poste respubliko) kiuj proklamis principojn inspiritajn de Klerismo, t.e. egalecon de ĉiuj civitanoj rilate al la leĝaro, la fundamentajn liberojn, kaj la suverenecon de la popolo, kiu kapablas regi sin per siaj elektitaj reprezentantoj. Tio ŝanĝis ne nur la historion de Francio sed de tuta Eŭropo.


Sturmado de la Bastilo, 14-an de julio 1789.

Tiujn ŝanĝojn akompanis perfortaj tumultoj, kiel ekzekutoj kaj repremoj dum la Teroro, kaj militoj implikantaj ĉiujn ceterajn grandajn regnojn en Eŭropo. Notindaj eventoj de tiu periodo estas la Napoleonaj Militoj, la restarigo de monarkio, kaj du pliaj revolucioj kiuj formis modernan Francion.

La universaleco de la ideoj de la franca revolucio estis preskaŭ tuj agnoskita de ĝiaj samtempuloj, oponantoj kaj subtenantoj. Ĝian influon draste plivastigis la militoj de la franca revolucio kaj de la 1-a franca imperio, kiuj trafis grandan parton de okcidenta Eŭropo, kun kreado de "frataj respublikoj" kaj la transformo de la landlimoj kaj Europaj ŝtatoj.

Ĝi tuj kreis longdaŭran fendon inter subtenantoj de la revoluciaj ideoj kaj defendantoj de la malnova regno, kiel inter kontraŭeklezIistoj kaj katolika eklezio. Ĝi formis la ĉefajn politikajn konceptojn kiuj validis ĝis hodiaŭ. Fontas el tiu periodo la vortostoko kaj la idearoj de la aktualaj liberalaj, radikalaj, aŭ demokratiaj partioj (kiel, notinde, la distingo inter dekstro kaj maldekstro), la leĝlibroj de granda parto de la mondo, kaj la konceptoj de liberalismo kaj naciismo. Ĝi daŭre restas debatobjekto, kaj grava referenco, ĉu pozitiva aŭ ĉu malpozitiva.

http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Franca_revolucio_de_1789&oldid=3449244 kontribuintoj de Vikipedio CC-BY-SA; pritondo: Marek Blahuš • http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Prise_de_la_Bastille.jpg PD • La nomo *Wikipedia*® kaj la *puzla globo* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.

# Neŭtrala vidpunkto

- Artikoloj subtenu neniun unuopan vidpunkton
  - Neniu estas „la vero“ aŭ „la plej bona“
- Ĉiuj informoj laŭeble estu kontroleblaj
  - Referenco al serioza ekstervikipedia fonto
- Distingo inter opinio kaj fakto:
  - *„Jesuo estas la Filo de Dio“* -- opinio
  - *„Kristanoj kredas, ke Jesuo estas la Filo de Dio“* -- fakto

# Vikipedio estas libera

- Via kontribuo estos redaktata kaj disvastigata sen mizerikordo!
  - Neniu estas posedanto de iu artikolo
  - Kontribuaĵoj disponeblas laŭ CC-BY-SA
- Ne enmetu enhavon kiu malrespektas kopirajton
  - Ĉio en Vikipedio devas esti libere reuzebla
  - Laŭvortaj kopioj de jam publikigitaj tekstoj akcepteblas nur kun livero de permesdeklaro

# Propra konduta kodo

- Estu ĝentila al aliaj redaktantoj
  - Supozu bonan intencon
  - Multaj estas novuloj aŭ alikulturanoj
- La komunumo starigis proprajn regulojn
  - Diskutoj pri artikoloj, decidoj per baloto
  - Redaktomilitoj kaj regulo de la 3 malfaroj

# Redaktu kun kuraĝo


- Estu kuraĝa kaj ne timu eksperimenti
  - La aliaj uzantoj helpos al vi (komento, uzantopaĝo)
- „Kial estas en tiu artikolo tiaj eraroj?“
  - „Ĉar Vi ilin ne korektis!“
  - Vikipedio estas kunlabora projekto, ĉiu kontribuas
- Ne timu korekti, eĉ se vi ne tute certas
  - Mistajpaĵojn aŭ evidentajn malverojn forigu tuj
  - Kaze de hezito eblas atentigi en diskutpaĝo

# Vikipedio post unuaj 10 jaroj

- 18.448.272 artikoloj
  (tra la 281 lingvaj versioj)
  - 69.552.617 paĝoj entute
- 1.105.897.932 redaktoj
- 28.588.483 uzantoj
  - 4.850 administrantoj
- 1.949.753 multmediaĵoj (bildoj, sonoj, videoj)
  - 10.005.495 en Wikimedia Commons
- 365.000.000 da legantoj

Fonto: http://meta.wikimedia.org/w/index.php?title=List_of_Wikipedias&oldid=2464903 Meta contributors, CC-BY-SA
http://commons.wikimedia.org/wiki/File:10piece-english-L_k.svg David Peters, CC-BY-SA
La nomo *Wikipedia*® kaj ties teksta versio *WikipediA* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.

# Angla Vikipedio



- 16,7 miliardoj da signoj (15887 MB)
- 2647 libroj (po 400 paĝoj)
  - sen bildoj, tabeloj ktp.

http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Size_of_English_Wikipedia_in_August_2010_%28L%29.svg Nikola Smolenski, Begoon CC-BY-SA; alikolorigo: Marek Blahuš

http://vo.wikipedia.org/w/index.php?title=Decatur_%28Tennessee%29&oldid=2197592 Vükiped contributors, CC-BY-SA; pritondo: Marek Blahuš

# Atento al kvalito

- Kvanto ne nepre indikas kvaliton
  - Volapük: 120.000 artikoloj „kreitaj“ de 5 homoj
  - Artikoloj kreitaj de robotoj estas polemikaj:

## Decatur (Tennessee)

Se Vükiped: sikloped libik

**Decatur** binon zif in komot: Meigs, in tat: Tennessee, in Lamerikän.

### Nüns taledavik [redakön]

Decatur topon videtü 35°31′ 8′′ N e lunetü 84°47′ 36′′ V (35,518871; -84,793201).

Ma el *U.S. Census Bureau* (Pöpinumamabür Lamerikänik), Decatur labon sürfati valodik mö 6,6 km² (vat: 0%).

### Lödanef [redakön]

Timü pöpinumam yela: 2000, mens 1 395, lomanefs 560 e famüls 366 älödons in Decatur. Lödanadensit äbinon

# Aliaj vikimediaj projektoj

- Wiktionary
- Wikisource
- Wikiquote
- Wikibooks
- Wikinews
- Wikiversity
- Wikispecies

- Wikimedia Commons
- Meta Wikipedia

La nomoj kaj emblemoj *Wikimedia, Wikimedia Commons, Wiktionary, Wikinews, Wikibooks, Wikiquote, Wikisource, Wikiversity* kaj *Wikispecies* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.

# Vikipedio morgaŭ



http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Vraagteken.svg PD

# Reviziado de artikoloj

- Enkondukita en Germana Vikipedio en 2008
  - Poste aldoniĝis pliaj, ankaŭ Esperanto
- Ĉiu artikolo enhavas tri gravajn versiojn:
  - Lasta versio (vidas nur ensalutintaj uzantoj)
  - Reviziita versio (ne enhavas evidentan malbonon)
  - Aprobita versio (fakulo pri la temo kontrolis ĝin)
    - ne jam enkondukita

# WikiTrans

- Redaktantoj ofte tradukas el alia lingvo
  - La libera permesilo faciligas tion
- Kvalita maŝintradukado povas helpi
  - http://www.wikitrans.net/
  - Ŝajne jam pli facilas revizii ol traduki de nulo
  - Integrigo en la vikipedian interfacon

http://epo.wikitrans.net/Tigro?eng=Tiger Kontribuintoj de Vikipedio (http://en.wikipedia.org/w/index.php?title=Tiger&oldid=345896905), CC-BY-SA; esperanto-traduko: GramTrans; pritondo: Marek Blahuš • http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Tigerramki.jpg Anant, CC-BY-SA

# Maŝintraduko per WikiTrans

## Tigro

Wikipedia's *Tiger* as translated by GramTrans

*Tiu artikolo temas pri la kato. Por aliaj uzoj, vidu Tigro (malambiguigo).*

La **tigro** ( *Panthera tigris*) estas membro de la Felido familio; la plej granda de la kvar " grandaj katoj" en la genro *Pantera* . [4] Indiĝena al multe de orienta kaj suda Azio, la tigro estas apekspredanto kaj deviga karnomanĝulo. Atingante ĝis 3.3 metrojn (11 ft) en sumlongo kaj pezante ĝis 300 kilogramojn (660 funtoj), la pli granda tigro-subspecio estas komparebla en grandeco al la plej grandaj formortintaj felidoj. [5] [6] Krom ilia granda maso kaj potenco, ilia plej rekonebla trajto estas padrono de mallumaj vertikalaj strioj kiu imbrikas preskaŭ-blankan ĝis ruĝet-oranĝan felon, kun pli malpezaj subpartoj. La plej multnombra tigro subspecio estas la Bengalio-tigro dum la plej granda subspecio estas la siberia tigro.

Tre flekseblaj, tigroj vagadas de la siberia tajgo, al malfermaj paŝtejoj, al tropikaj mangrovo marĉoj. Ili estas teritoriaj kaj ĝenerale izolaj bestoj, ofte postulante grandajn apudajn areojn de vivejo kiu apogas iliajn predopostulojn. Tio, kunligita kun la fakto ke ili estas endemiaj al kelkaj el la pli dense loĝitaj lokoj sur la tero, kaŭzis signifajn konfliktojn kun homoj. De la naŭ subspecioj de moderna tigro, tri estas formortintaj kaj la ceteraj ses estas klasifikitaj kiel endanĝerigite, kelkaj danĝernivele. La primaraj rektaj kialoj estas habitat destruction kaj fragmentiĝo, kaj ĉasado. Ilia historia atingejo foje strečis de Mezopotamio kaj Kaŭkazo tra la plej granda parto el Suda kaj Orientazio. Hodiaŭ ĝi estis radikale reduktita. Dum ĉiu pluviva specio estas sub formala protekto, ŝtelĉasado, habitat destruction kaj

**Tigro**



Bengaltigro ( *P. tigristigris*) en la Bandhavgarh Ŝtatano Parko de Hindio.

**Konserva statuso**

Extinct — Threatened — Least Concern

EX EW CR EN VU NT LC

Endanĝerigita ( IUCN 3.1) [1]

**Scienca klasifiko**

| | |
|---|---|
| Regno: | Animalia |
| Fylum: | Chordata |

# Semantika reto

- Vikipedio enhavas multegan scion
  - Ĝi ne estas tre bone strukturita
- Jam nun eblas serĉi tra kategorioj
  - Mia mistera renkontito el trajnvojaĝo: „Itala aktorino naskiĝinta inter 1930 kaj 1960“
- Projektoj kiel DBpedia (dbpedia.org) strebas analizi la enhavon kaj krei ontologion
  - „Itala aktorino naskiĝinta inter 1930 kaj 1960, kiu aktoris en usonaj filmoj, havas edzon el Strasburgo kaj nun loĝas en Berlino“

# Dankon pro via atento!

Marek Blahuš

marek@ikso.net

CC BY-SA 3.0

www.ikso.net

http://commons.wikimedia.org/wiki/File:E@I_angula.jpg E@I, CC-BY-SA

La nomo *Wikipedia®* kaj la *puzla globo* estas komercaj markoj aŭ registritaj komercaj markoj de Wikimedia Foundation, Inc., kiu havas neniun rilaton kun tiu ĉi prezentaĵo.